

# STARTO

**N-ro 1/2016 (258)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



*foto Matěj Nárožný*

**Marcipana Kristnasko en Esperanto-Muzeo Svitavy**

**La 6-an de decembro 2015**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IĈ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidentino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumado, kontakto)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

## Revizia komisiono de ĈEA:

**Prezidanto:** Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorferdomo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, [muzeo@esperanto.cz](mailto:muzeo@esperanto.cz), [www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz)

**Kontrollegis:** la komitato

# LABORI POR PACO EN MALPACA MONDO

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

La pasintan jaron ombris militoj kaj atencoj. Sirio, Irako, Jemeno; Sud-Sudano, Niĝerio, Centrafrika Respubliko; Mjanmao, Pakistano, Afganio; Ukrainio, Meksiko, Kolombio... en ĉiuj kontinentoj, miloj da homoj mortis perforte, per bomboj kaj pafiloj, en daŭrantaj konfliktoj diversspecaj. Teror-atakoj amase mortigis civitanojn en Ankaro, Garisso, Bejruto, Parizo, Tunizo, San-Bernadino. Pri kelkaj el tiuj tragedioj oni vaste raportis; pri aliaj nur malmulte. Sed pri rapidaj kaj facilaj solvoj oni ne povas paroli, ĉar temas pri fruktoj de longa malpaca historio.

Tiu malpaca historio estas la fono, sur kiu aperis kaj disvolviĝis nia movado por "lingvo neutrale homa". Ni ĉiuj konas la alvokojn de Zamenhof, ke ni, "pacaj batalantoj", laboru por starigi "unu grandan rondon familian" en kiu ĉiuj homoj kaj popoloj povus senti sin sekuraj kaj juste traktataj. Sed ni ne forgesu, ke li faris tiujn alvokojn fronte al kruelaĵoj, kiuj hante similas tiujn de la nuna mondo. Jam en la dua Universala Kongreso en Ĝenevo, 1906, li elvokis la eventojn en sia ruslanda patrujo:

"Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive

certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj songoj mi ekvidis teruran efektivaĵon: en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas."

Kompreneble Zamenhof ne povis antaŭvidi, kiom pli teruraj kaj amasaj estos la suferoj de viktimoj en la unua kaj dua mondmilitoj, kiam pereos i.a. liaj propraj familianoj. Sed li jam komprenis, kiel li diris la postan jaron en la londona Gildhalo, ke "longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero", antaŭ ol "la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj".

Kiel ni esperantistoj kondukis, fronte al tiuj realaĵoj? Evidente ni ne estas imunaj kontraŭ antaŭjuĝoj kaj misperceptoj pri niaj kunhomoj; ĉiu el ni dividas, certgrade, la valorojn kaj vidpunktojn de siaj etno, socia klaso, amaskomunikila medio kaj simile. Iĝante esperantisto, oni ne demetas siajn aliajn identecojn. Tiel eblas, ke esperantistoj tiriĝas al malsamaj flankoj en diversaj konfliktoj, aŭ pli spontane sentas solidarecon kun iuj viktimoj

ol kun aliaj. Tiel eblas, ke ankaŭ en Esperanto foje aperas esprimoj de mal-toleremo, malrespekto, eĉ malamo.

Lerni Esperanton estas efektive nur unu paŝo sur longa, preskaŭ senfina vojo al homaraneco. La lingvo donas al ni multon: esprimilon, komunikilon, kultur-bazon, tradiciaron; unuvorte, komunumon. Sed, por citi Zamenhof denove: "Ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn." Nia komunumo estas lernejo, en kiu la lernantoj estas samtempe la instruistoj, en kiu la studfakoj kovras la tutan vivon de la homaro, en kiu la fina diplomo neniam estas atingita. Esperanto provizas fundamenton, konstrumaterialojn; ni faras la ceteron mem, laŭ niaj povoj.

Tiuj povoj ankoraŭ ne etendiĝas al la ĉesigo de militoj, kiel revis Zamenhof. Ni dividas la timojn kaj la sentojn de la ordinaraj homoj, kiujn trafas la minaco de bomboj kaj kugloj. En niaj diversaj hejmlokoj, ni venas al diversaj starpunktoj pri la politikaj kaj sociaj demandoj, kiuj naskas teroron kaj militon. Sed kiel esperantistoj, ni povas strebi al solidareco, al reciproka kompreno, al kunlaboro kaj kunlernado nelimigitaj de haŭtkoloro, kredo, kulturo. Al la detruado ni povas kontraŭmeti konstruadon; al la klopodoj disigi kaj marĝenigi homojn ni povas respondi per malfermitaj brakoj kaj pordoj.

Kiel fari tion pli efike, pli konsekvence, pli bone – jen grava demando por la 101-a Universala Kongreso en Nitro. Sub la temo "Socia justeco — lingva justeco" ni havos okazon reрпиensi la laboron de la esperantistoj por pli paca mondo. Ni ja ne estas solaj en tiu laboro; amaso da movadoj, multe pli ol en la

tempo de Zamenhof, dividas niajn valorojn kaj niajn celojn, se ne ankoraŭ nian lingvon. Malfermante nian modestan memlernejon al iliaj ideoj kaj atingoj, enplektante ilin en niajn diskutojn kaj planojn, ni samtempe plifirmigos nian pozicion en la tuthomara strebado por paco kaj justeco.

Mi deziras al ĉiuj esperantistoj pacan kaj solidarecan jaron 2016!

MARK FETTES

## NOVA REDAKTORO POR LA REVUO "ESPERANTO"

El ses kandidatoj por sekvi Fabrício Valle kiel redaktoro de la revuo 'Esperanto', la Estraro de UEA elektis Attila Kaszás (47). Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politologo kaj li laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj manaĝisto.

"Ni estas tre feliĉaj pri la kvalito de la homoj, kiuj proponis sin por tiu grava rolo", komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. "Denove nia komunumo montris, kiom da talentoj ĝi daŭre sukcesas nutri. La redaktoro estas ŝlosila ano de nia teamo en la Estraro kaj Oficejo, kaj mi antaŭvidas ke Attila plurflanke kontribuos al niaj laboroj por la renovigo de la Asocio."

Kaszás transprenos la redaktadon de la revuo ekde la maja numero ĉi-jare. "Dum la lastaj semajnoj mi konstante cerbumas pri la revuo, mi estas plena je ideoj, temoj, rubrikoj, artikoloplanoj", li entuziasmas.

*(laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA)*

# Kial veni al Nitro?



**“Kial veni al Slovakio por la 101a Universala Kongreso de Esperanto?” La prezidanto de LKK Peter “Petro” Baláž responde al ĉi tiu demando listigas kelkajn argumentojn kaj kialojn:**

La Universala Kongreso en Slovakio havos kelkajn specialaĵojn, pro kiuj indos ĝin partopreni:

- Historie unua UK en Slovakio.
- Ekologia kongreso (multaj partoprenantoj de Eŭropo povas atingi ĝin trajne, buse, aŭte, sen bezono de flugoj, ene de la urbo oni eĉ ne bezonos urban trafikon aŭ aŭtojn).
- Ekonomia kongreso (la tranoktado-prezroj ekas jam ĉe 7 EUR/nokto, ankaŭ la manĝokostoj estas modestaj, ekzemple, tagmanĝo en restoracio: 3,50 EUR, biero: 1 EUR).
- Pieddistanca kongreso (kongresejo, hoteloj, studenthejmoj, urbocentro, restoracioj, aĉetcentroj, ĉio ene de pieda distanco de 1 km).
- Videbla kongreso (Nitro estas relative malgranda urbo, danke al kio Esperanto

kaj la kongreso estos tre bone videblaj al la loĝantoj de la urbo).

– Gastamo kaj gastronomio (indas veni sperti la slovakon gastamon kaj diversajn erojn de la slovakaj gastronomio: bongustegaj kaj kvalitaj vino kaj biero, multaj bonaj kaj favorprezaj manĝoj ktp.).

– Eblo malkovri Slovakion (landon meze de Eŭropo, kun tre riĉa historio, vidindaĵoj, naturbelajaĵoj).

Eblo ekkoni slavan kulturon (Nitro estis lulilo de la unua slava skribo: glagolico. Dum UK eĉ eblos lerni skribi per ĝi! Same okazos pluraj prelegoj pri slavaj temoj.).

– Nova jarcento de kongresoj (impulso por modernigo, novigo de la plej granda Esperanto-festivalo).

– Riĉega junulara programo (Nepre indos ĝin partopreni, la programeroj estos tre variaj kaj allogaj!).

– Riĉa kultura programo (koncertoj, teatraĵoj, filmoj, ekspozicioj, diskotekoj...).

– Riĉa faka programo (akompanaj aranĝoj, scienca kafejo, kleriga lundo, kreivaj metiejoj ktp.).

Ĉi-jara kongresa celo estas agi ekstermovade kaj malfermi nian movadon al la mondo kaj serĉi aliancantojn por kunlaboro kaj nia plua pli efika agado. La 101a UK volas por tiu ĉi celo utiligi la fakton, ke la kongreso okazos en la tempo, kiam Slovakio prezidos la Konsilion de EU (julio – decembro 2016). Dum la 101a UK la 23–30an de julio 2016 okazos kvar malfermitaj fakaj aranĝoj:

1. Lingvo-politika konferenco de Viŝegradaj landoj V4+ “Perspektivoj de lingva komunikado en EU”.
2. Internacia entreprenista kaj komerca forumo “Investi en koro de Eŭropo – investi en Slovakio”.
3. “Inter-religia renkontiĝo” de reprezentantoj de diversaj religioj.
4. La 20a Internacia Medicina Esperanta Kongreso.

Certe indas mencii ankaŭ pli vastajn kaj ĝeneralajn kialojn veni al UK 2016:

- Renkonti siajn (malnovajn) amikojn
- Ekkoni novajn amikojn de la tuta mondo
- Subteni la plej grandan Esperanto-aranĝon kaj Esperanto-organizon
- Sperti unikan atmosferon de UK, la spiriton de amikeco, lingva egaleco kaj homa interkompreniĝo kaj frateco

Se vi ne trovis en la listo “la vian” kialon, volonte informu nin pri tio: [lk@esperanto.sk](mailto:lk@esperanto.sk)

Kaj se vi jam venos al UK pro iu ajn kialo, dankon anticipe kaj: ĝis revido somere en Nitro!

Pliaj detaloj pri la 101a UK troviĝas ĉi tie:

<http://www.nitra2016.sk/>  
<https://www.facebook.com/uk2016>  
<http://www.uea.org/kongresoj>

Respondis  
**Peter Baláž**  
 LKK-prezidanto

*represita el La Ondo de Esperanto*

## KER-ekzameno de Esperanto

Certe vi scias ke dum UK en Nitra eblos trapasi KER-ekzamenon de Esperanto (la oficialan ekzamenon pri la scipovo de Esperanto).

La ekzameno estas proponata je tri niveloj: baza, meza kaj supera. Tiuj niveloj konformas al la priskriboj de la Komuna Eŭropa Referenckadro je **B1** (44 €), **B2** (48 €) kaj **C1** (54 €). La parola ekzameno kaj la skriba kune rezultas la kompletan ekzamenon, sed ili ankaŭ plenumblas aparte. La sukceslimo en ambaŭ tipoj kaj je ĉiu nivelo estas 60%.

**Se troviĝos minimume 5 interes-igantoj** por la ekzameno (povas esti en diversaj niveloj) mi pretas organizi la sesion kun **skriba** parto (ĉar ĝi estas pli temporaba) en Partizanske (ĉar nur tie ni povas havi senpage iun ejon por okazigi ĝin kaj ni havas ankaŭ tie plurajn PIV kiuj devas ĉeesti la ekzamenon).

Se vi farus la skriban (pli temporaban) parton junio, vi povus fari la parolan parton dum UK (kiu prenas de vi sume nur horon). La skriba parto daŭras 2/3 aŭ 4 horojn respektive laŭ la niveloj B1/B2 kaj C1.

Se vi interesiĝas pri la ekzameno kaj ŝatus fari skriban parton de ĝi **4-an de junio 2016** en Partizanske, bv. skribi mesaĝon kun via persona nomo, familia nomo kaj la nivelo de ekzameno kiun vi ŝatus trapasi al mi, Dorota Rodzianko, je [dorota.rodzianko@gmail.com](mailto:dorota.rodzianko@gmail.com). Kotiztabelo: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj>.

Mi memorigu ke junuloj, membroj de TEJO rajtas peti 50% repagon de kosto de ekzameno (kaze ke la ekzameno estos sukcesa).

*Dorotka*

# RAPORTO PRI ĈEA-AGADO

inter la 15-a kaj la Anstataŭa 16-a Kongresoj (2014/11-2015/10)

(krom plenmumo de Ĉefaj prioritatoj - la raporton vidu en Starto 2015/4)

## 1) INFORMA AGADO

1.1. Realigis 4 elsendoj pri Esperanto en radio kaj 4 elsendoj en televido (3 en la regiona kaj 1 en ĈT1). La ligiloj troveblas en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) en la rubriko *O esperantu*. - 1.2. Artikoloj aperis ĉi-foje preskaŭ nur en regionaj ĵurnaloj (denik.cz: Svitavy, Brno, Písek, Zlín, Česká Lípa; Jiskra Benešov; urba monatgazeto Naše město Svitavy). - 1.3. Migra ekspozicio "*Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*" estis gastigita en Olomouc (entute 4 monatojn en du lokoj), Uherský Brod, Pardubice, Pacov, Sušice kaj Netolice, dank al bona kunlaboro kun kluboj aŭ individuaj membroj. Ĝis nun la ekspozicio okazis en 37 institucioj de 12 regionoj. - 1.4. Informiloj de ĈEA - sufiĉe ofta estis informado kaj ĉeĥlingva kaj esperantlingva pere de la ĈEA-retejoj ([www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), [muzeum.esperanto.cz](http://muzeum.esperanto.cz)), Starto, Retkomunikoj (2 numeroj) - prizorgas P.Dvořáková-M.Malovec-M.Hruška, kelkaj klubaj retejoj (aparte menciindas nova retejo de EK Brno), Ipernity, Facebook kaj Youtube.. - 1.5. Kelkaj kluboj aktive prizorgas sian surstratan informtabulon (Pardubice, Česká Třebová) - 1.6. En interreto disponeblas videoregistraĵo de la prelego de M.Malovec dum la 6-a Vikikonferenco, en Brno. - Resume la rezultoj en tiu ĉi agadkampo estas relative kontentigaj. Tamen pliaj kunlaborantoj daŭre serĉatas.

## 2) LINGVO - lernado, instruado, tradukoj, eldona agado, kulturo

Stato de instruado de komencantoj estis bedaŭrinde ne tro optimisma. Lastjare okazis instruado nek en la ĝisnunaj porinfanaj rondetoj, nek en Masaryk-Universitato, stato de korespondaj kursoj plu stagnis. Pozitiva novaĵo estis fondo de skolta Esperanto-rondeto en Prostějov. Kursojn en Lernu.net sekvis ĉ. 30 ĉeĥlingvanoj. Regula lingvoperfektigado por membroj plu okazas en pluraj kluboj (precipe Mladá Boleslav, M.Budějovice, Svitavy, Olomouc, Brno, Ústí nad Labem, Šumperk). Okazis seminario "Traduka Printempo" (EK Praha) kaj "Lingva Seminario" en Jevany (EK Pardubice). - Specifaĵo kaj atingiĵo de la jaro estis pluraj sukcesaj **eldonprojektoj bazitaj sur kolektiva kunlaboro**: precipe pretigo de la nova lernolibro "*Esperanto od A do Z*" (eld. KAVA-PECH), tradukoj por elektronika libro omaĝe al la jubileo de Majstro Jan Hus, Gastronomia vortaro ĉeĥa-Esperanta (eldonis M.Turková), Legolibretoj X kaj XI (eldonis J.Drahotová). Pri ĉiuj novaĵoj informis Aktualajoj en [esperanto.cz](http://esperanto.cz). Lingva rubriko en [esperanto.cz](http://esperanto.cz) ne estis daŭrigata, sed estis nove alirebligataj aŭtore liberaj ciferecitigitaj tradukoj el Esperanto-literaturo. J.Drahotová publikigis elektronikforme sian ĉeĥlingvan tradukon "*Paměti Vladimíra Samodaje*". SILE Brno eldonis tradukojn de ĈEA-membroj Věra Muchnová (V.Nosková-*Metamorfozoj*) kaj O.A. Fischer (B.Fišerová - *Ĉerkoturneo*). P.Chrdle kaj J.Řepa kun la ensemblo DOMA Svitavy prezentis R.U.R. de K.Čapek dufoje en Slovakio (SES kaj SAT-Kongreso).

### **3) KLUBOJ KAJ SEKCIOJ**

Mapo de kluboj kaj regionaj delegitoj disponeblas en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz). Nuntempe ekzistas kluboj kun 3 diferencaj juraj statusoj, pri kies klarigo okazis traktado kun la ĈEA-prezidanto. 20 funkcias almenaŭ porokaze, 6 pli malpli formale. 14 kluboj anoncis regulajn kunvenojn almenaŭ 1foje monate (Praha, Brno, Pardubice, Svitavy, M.Boleslav, Ostrava, Havířov, Olomouc, Přerov, Prostějov, Ústí n.L., Ĉ. Třebová, M.Budějovice, Šumperk). En 2015/12 anoncis nuligon klubo en Hradec Králové. En 7 urboj disponeblas regionaj delegitoj. La plej vigla klubo en Svitavy prezentas apartan raporton sur la p.22

EK Praha renovigis en 2014/11 Esperanto-monumenton ĉe la Kongresejo kaj daŭrigas eldonadon de BULTENO kun nova alloga enhavo (disponebla ankaŭ elektronike). EK Brno laŭdindas precipe pro regulaj kvalitaj prelegoj disponeblaj ankaŭ en interreto. EK Pardubice plu kunlaboras pri eldonado de la monata AEH-Infomilo (distribuata al 170 adresoj, el tio 30 en 17 landoj). Ĝi sukcese realigis busekskurson al la 100-a UKo en Lille por 47 membroj de AEH, ĈEA kaj GEA. - Tradiciaj unutagaj klubaj aranĝoj - okazis (kronologie) AnkRo kun Adventa Matineo en Písek, Marcipana Kristnasko en Svitavy, Silvestro en Česká Třebová, Printempa renkontiĝo en Moravská Třebová kaj Svitavy, Renkontiĝo de EK Šumperk en Vikýřovice, Grimpado al Granda Ĉantorio (EK Ostrava), Renkontiĝo de ekstendaranoj en Lančov, Postferia renkontiĝo de EK Písek en Netolice. Krom jarkunvenoj estis plurloke organizitaj ankaŭ apartaj neformalaj klubaj aranĝoj: kristnaskaj vesperoj en kelkaj kluboj (Praha, Brno, Olomouc, Přerov k.a.), Ovfritaĵo en Místek, E-tendarfajro en Havířov, oktobra solenaĵo en Písek k.s. Okazis ankaŭ nova porokaza renkontiĝo en Pacov (lige kun la migra ekspozicio). J.Řepa kaj EK Svitavy teatre prezentiĝis por la publiko dum la Muzea nokto en Svitavy. Pluraj kluboj gastigis 12membran grupon el Francio, realiĝis pliaj eksterlandaj vizitoj (el Suda Koreio en Prago, el Kanado en Prostějov, el Svislando en Olomouc, el Pollando en Ĉ. Třebová kaj Svitavy, dufoje el Ĉinio en Svitavy k.a). Pluraj kluboj aktivis pere de siaj retejoj, en Facebook kaj Youtube. Al la alvoko ligi klubajn aktivecojn kun konkretaj ĈEA-projektoj (Memoro de la movado, Vikipedio, Ciferecigo, turismaj tradukoj) la kluboj plejparte bedaŭrinde ne reagis, - Pluraj membroj de la katolika kaj kristana sekcioj (IKUE kaj KELI) partoprenis Ekumenan kongreson en Strasburgo. Katolika sekcio krom regula eldonado de "*Dio benu*" organizis renkontiĝon en Třeboň. Kristana sekcio plu printis kaj distribuis KELI-gazeton "*Dia regno*". Sekcio de nevidantoj plu daŭrigis eldonadon de la gazeto "*Aŭroro*" kaj kontribuis al LIBE-"*Ligilo*". Firmiĝis kunlaboro kun ĈEA: okazis i.a. interŝanĝo de sonregistraĵoj kaj geedzoj Jelínek kaj Karaš registris muzikan KDon, kiun ĈEA planas eldoni en 2016. Geedzoj Jelínek ankaŭ aktive kontribuis al prelega kaj muzika programo de la inaŭguro de la nova ekspozicio en Svitavy.

*Surbaze de la kongresa prezento resumis kaj esperantigis -padv-*



**Výsledek hospodaření ČES za rok 2015, plán na rok 2016  
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

<b>Příjmy</b>	rok 2015	plán 2016	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2015	
Příspěvky na běžný rok	21 770	23 000	<b>peněžní prostředky</b>	
Příspěvky dobrovolné	7 486	8 000	pokladna korunová	400
Příspěvky na budoucí rok	25 457	25 000	pokladna eurová	3 648
Dary členů	62 669	35 000	postkonto	0
Dary nečlenů	638	0	účet Fio	100
Dotace	22 000	15 000	účet Fio spořicí	420 756
Starto předplatné	1 020	1 000	<b>peníze celkem</b>	<b>424 904</b>
Konference a sjezdy	34 995	45 000	<i>změna vůči 31.12.2014</i>	167 712
Činnost klubů a sekcí bez PS	770	2 000	<b>investice</b>	
Muzeum	0	0	podílové listy	190 485
Libroservo	6 642	8 000	<b>investice celkem</b>	<b>190 485</b>
Kurzy esperanta	2 200	4 000	<i>změna vůči 31.12.2014</i>	-538
Příspěvky UEA ind. běžný rok	6 380	7 000	<b>pohledávky</b>	
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	32 445	20 000	UEA subkonto	47 114
Platby UK na běžný rok	22 969	15 000	ÚP Praha za listopad 2015	23 900
Platby UK na budoucí rok	142 643	5 000	Knihovna Košice	297
Platby ILEI a pedagog. komise	900	900	<b>pohledávky celkem</b>	<b>71 311</b>
Úroky z účtů	123	100	<i>změna vůči 31.12.2014</i>	-83 897
Virtuální adresa	0	200	<b>ostatní majetek ČES</b>	
Zaměstnanci - příspěvek UP	143 400	143 400	drobný majetek v ceně pořízení	156 852
Předkongres UK Svitavy		230 000	knihy v libroservu (odhad)	27 058
<b>Příjmy celkem</b>	<b>534 507</b>	<b>587 600</b>	<b>ostatní majetek ČES celkem</b>	<b>183 910</b>
			<i>změna vůči 31.12.2014</i>	4 964
<b>Výdaje</b>	rok 2015	plán 2016	<b>závazky</b>	
Starto tisk	20 386	20 000	platby pro UEA	6 240
Starto distribuce	12 781	13 400	platby pro UK	142 643
Konference a sjezdy	47 176	60 000	klub Brno	2 695
Činnost klubů a sekcí bez PS	4 015	5 000	<b>závazky celkem</b>	<b>151 578</b>
Administrativa, kancel. pořeby	2 602	2 500	<i>změna vůči 31.12.2014</i>	10 788
Jízdné funkcionáři	3 097	5 000	<b>účelově vázané prostředky</b>	
Přísp. na stravné za schůze	600	700	fond Tilio	27 392
Muzeum	21 395	20 000	fond ediční	12 660
Libroservo nákup zboží	0	8 000	fond Cigno	31 197
Libroservo poštovné a balné	0	600	kluby a sekce bez právní subj.	79 034
Kurzy esperanta	0	200	<b>celkem</b>	<b>150 283</b>
Příspěvky UEA ind. běžný rok	14 060	13 600	<i>změna vůči 31.12.2014</i>	-1 878
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	26 205	20 000		
Platby UK v běžném roce	156 079	157 000		
Platby UK na budoucí rok	0	5 000		
Platby ILEI a pedagog. komise	277	800		
Kolektivní členství v UEA	1 230	1 000		
Kolektivní členství v EEU	1 386	1 400		
Blahopřání, kondolence	1 143	1 000		
Poplatky	140	50		
Zaměstnanci	168 796	121 835		
Daň z úroku	23	15		
Nový majetek	12 005	10 000		
Závazky k sam. klubům		2 700		
Předkongres UK Svitavy		200 000		
<b>Výdaje celkem</b>	<b>493 396</b>	<b>669 800</b>		

Pozn:

- zaměstnanec na celoroční úvazek do 30.4. je spolufinancován ze státního rozpočtu a Evropského sociálního fondu s minimálním dopadem na výdaje ČES
- majetek ČES se reálně zvýšil o cca 73 t Kč

## AKTUALAJ TASKOJ POR ĈEA-AKTIVECO EN 2016



Sukceso de ilia realigo dependas de ĉiu el vi - ne forgesu, ke "ĈEA ne estas nur komitato"! Pliaj iniciatoj bonvenas! Kaze de intereso pri kunlaboro ne hezitu skribi al [vybor@esperanto.cz](mailto:vybor@esperanto.cz)!

### **Gvidado de la asocio**

- Por balotoj en oktobro 2016 serĉatas precipe: nova prezidanto, volontuloj por prilaboro de subvencipetoj kaj kontaktoj kun amaskomunikiloj

### **Informa agado**

- realigi finan etapon de la migra ekspozicio  
- argumente adaptiĝi al nuntempa socia situacio, por gazetaro, blogoj kaj dum prelegoj menciigi Esperanton ankaŭ kiel "nuran" rimedon al aliaj allogaj celoj

### **Instruado**

koncentriĝi pri prilaboro de metodiko de t.n. "fulmokursoj"  
prilabori koncizan prezenton de Esperanto por lernejoj  
- dum ĈEA-Kongreso realigi instrukciadon pri utiligo de Lernu.net  
- denove alparoli Lernu-studentojn kun oferto de aranĝoj de ĈEA  
- diskonigi la novan lernolibron "Esperanto de A ĝis Z"  
kaj serĉi novajn reklameblecojn por korespondaj kursoj  
- interŝanĝi spertojn kaj instrumaterialojn inter kluboj

### **Aranĝoj** - vidu Kalendaron de aranĝoj

La ĉefaj prioritatoj de la jaro estas oficiala Antaŭkongresa Ekskurso en Svitavy (19.-23.7.) kaj la 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov (13.-16.10.)

Subteno de la 101-a UKo en Nitra

- aliĝo de ĈEA-membroj en kategorio de helpantoj  
- pretigi informmaterialojn pri ĈEA por Movada Foiro

### **Esperanto-Muzeo en Svitavy**

- fini aliĝon al Adresaro de muzeoj kaj galerioj en Ĉeĥio  
- serĉi novajn eblecojn por diskonigo de la muzeo en la urbo kaj en Ĉeĥio  
- pretigi pruntoregularon de la ĈEA- Biblioteko  
- pretigi subvencipeton pri teknika modernigo de la muzeo  
- kolekti ideojn por altigo de vizitateco (inkl. eksterlanda)

### **Starto**

- serĉatas nova ĉefredaktoro aŭ minimume pliaj kontribuantoj  
- realigi diskuton pri ebla nova aspekto kaj enhavo (novaj rubrikoj)

### **Retejoj [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kaj [muzeum.esperanto.cz](http://muzeum.esperanto.cz)**

- serĉatas kontribuantoj kaj prilaboranto de pli moderna teknika versio  
- alvoko al pli oftaj individuaj vizitoj kaj al diskonigo eksterlande

### **Specialaj projektoj:**

Ciferecigo, Memoro de la movado, Vikipedio, kaj Jubileo de d-ro Zamenhof en 2017

- pli detalaj informoj aperos en Starto 2016/2

[laŭ diskuto dum la 16-a ĈEA-Kongreso en Ústí n.O. prilaboris -padv-](#)

ĈEA-komitato elkore invitas vin al  
**La 16-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**  
**13.-16.10.2016 en Pelhřimov**



Ĉi-foje gastigos nin ĉarmetosa distrikta urbo kun pli ol 16 000 loĝantoj, situanta en la Regiono Vysočina. La unua skriba mencio pri ĝi devenas el 1225. Ĝi estas proklamita kiel urba monumentrezervejo kaj konatas ankaŭ kiel urbo de kuriozaĵoj kaj rekordoj, do laŭ turisma vidpunkto ĝi sendube havas multon por oferti.



Loĝado, manĝoj kaj parto de la programo okazos en Studenthejmo de la Industria mezlernejo, situanta proksime al la busstacidomo (kun konektoj el direktoj Prago kaj Jihlava-Brno). Por tranokto disponeblas 2(-maks.3)litaj ĉambroj (kun duŝejo / necesejo komunaj por 2 ĉambroj).

Krom necesa labortraktado (inkluzivanta ĉi-foje ankaŭ elekton de la nova estraro) ni preparas por vi fakajn seminariojn, projekciadon, urbotrarigardon, duontagan ekskurson, kulturalan vesperon kaj dancvesperon kun tombolo. La loka kunorganizanto estas

Esperanto-rondeto Montetaro gvidata de d-ro Max Kašparů.



Detalaj informoj kun aliĝilo aperos en la sekva numero de Starto kaj en Kalendaro de aranĝoj en

[www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz).

Ne forgesu jam nun noti la daton en viajn notlibrojn!

## **19-a Esperanto-Tago en Pardubice**

**sabate 4.6.2015 je la 10-a horo  
en nova kafejo de la kastelo**

AEH kun Klubo de esperantistoj de d-ro Schulhof sub aŭspicio de Magistrato de Pardubice invitas al jena programo: raporto pri la agado de la klubo, Teatro de unu aktoro (S. Hošková) pri Karolo IVa, prelego pri Karolo IVa, promeno sur remparoj aŭ tra la kastelo. Intereson pri tagmanĝo sciigu al: [ae@esperanto-ae.eu](mailto:ae@esperanto-ae.eu) aŭ telefone 466 611 941 ĝis 25. 5. 2016

## Omaĝe al mia Esperanto-patro

En decembro 2015 povis festi en plena sanstato sian 90jariĝon mia Esperanto-patro Martin Stuppig, kiun mi volas do prezenti al tiuj ĉeĥaj esperantistoj, kiuj ne konas lin (ja mi scias, ke multaj, precipe fervojistoj, konas lin bone).



Unue mi klarigu, kial mi nomas Martinon „mia Esperanto-patro“. Pro tio mi devas reveni en la sepdekajn jarojn de la pasinta jarcento, kiam mi estis esperanta suĉinfano. Mi lernis Esperanton plejparte autodidakte post nefinita koresponda kurso ĉe mia lektoro Pavel Polnický. (Ke mi forlasis la kurson ne estis kulpo de la lektoro, sed de mia pigreco kaj prefero de aliaj aktivecoj.) Tial mi relative bone komprenis la tekstojn, sed neniam uzis Esperanton parole.

Ĉar mi tiam laboris ĉe fervoja esplor-instituto, mi pro scivolemo aliĝis al fervojista Esperanto-konferenco okazinta en Davle, do relative proksime de mia hejmo. Mi sufiĉe bone komprenis la prelegantojn, sed parolis nur ĉeĥe kun ĉeĥaj partoprenantoj, kaj eliris el mia buŝo nur kelkaj hezitolplenaj vortoj en Esperanto, kiam mi estis alparolita sur-

koridore fare de du aŭ tri eksterlandaj esperantistoj.

Survoje de la konferenco mi hazarde ekvidis en la ĉefa stacidomo en Prago unu el tiuj partoprenintoj de la konferenco, kiu dum la konferenco alparolis min surkoridore kaj kiu laŭ mia memoro salutis nome de Aŭstrio. Mi strebis ŝajnigi min, ke mi ne vidas lin, por ke mi ne devu denove paroli en Esperanto, ĉar mi hontis pro mia nesufiĉe bona lingva scio. Sed li (feliĉe!) ekvidis min, alkuris kun rideto kaj ĝoje alparolis min “Ho, samideano, saluton, kien vi veturas?”.

Mi respondis germane, ĉar mi sciis, ke mia germana estis tiutempe certe multe pli bona ol Esperanto, sed li mirigis min respondante en Esperanto: “Mi ne komprenas, bedaŭrinde”, kaj li daŭrigis en Esperanto. Mi estis ŝokita, ĉar mi preskaŭ pretus ĵuri, ke li salutis nome de Aŭstrio. Tamen mi komencis timeme balbuti en Esperanto, ke mi veturas al České Budějovice. Kaj li tuj “Kia feliĉa koincido, ni veturos per la sama trajno kaj do povos babili”. Kaj ni jam restis komune ĝis ni venis al la ĝusta trajno. Tie mi ekĝojis pri la fino de mia hontiga balbutado, ĉar evidentiĝis, ke li havis sidlokbileton por la unua klaso, dum mi por la dua. “Mi estas savita” mi esperis.

Sed ho ve! Ne por longa tempo! Post kiam la trajno ekveturis, li ekaperis en la pordo de mia kupeo, rideton de unu orelo al la alia, kaj diris: “Venu, venu, samideano, ĉi tie estas tro okupite, do mi invitas vin en la restoracivagonon”. Mi strebis dece rifuzi, sed ne sukcesis.

Post kelkaj minutoj ni jam sidis en la restoracivagono, trinkis bieron kaj babilis pri ĉio ebla. Li perfekte gvidis la konversacion, sekve mi eksciis multon pri la fervojista Esperanto-movado, li multon pri mi, sed mi ne estis tiel konversacisperta en Esperanto, ke mi kapablus ŝanĝi la temon por ekscii ion pri tiu gaja, sed por mi mistera esperantisto.

Komence de nia interparolo mi balbutis terure. Sed post unu horo kaj duono, kiam ni devis adiaŭiĝi, ĉar la trajno disiĝis al du, la unua (kun mi) pluveturis al České Budějovice, dum la dua forportis lin cele Vienon, mi jam parolis relative bone kaj do kuraĝis ankaŭ ion demandi. Mia unua demando nature estis “De kiu lando vi estas?” La respondo ŝokis min: „De Aŭstrio”.

Mi konfuziĝis - kial li, diable, diris, ke li ne komprenas la germanan? Do mi demandis. La respondo de tiu „trompulo“, kiu tamen sekve fariĝis mia tre proksima amiko, estis ”Kiam mi estas inter esperantistoj, mi tuj ekforĝegas mian gepatran”. Ekde tiam mi konsideras Martinon Stuppnig mia Esperanto-patro, ĉar estas li, kiu vere sukcesis paroligi min dum malpli ol du horoj – eĉ kontraŭ mia volo!



Sed reen al lia 90jariĝo: Nelonge antaŭ sia jubileo Martin sendis al mi donace sian libron *Kriegsimpressionen*. Mi sciis, ke li verkas siajn memoraĵojn el la milito, en kiu li, aŭstra junulo, devis batali „por la venko de la Tria Imperio“, li eĉ estis sendinta al mi fragmenton, sed mi ne supozis, ke tio estos tiom ampleksa kaj fariĝos tiel bela libro.

Tuj post la konatiĝo kun la enhavo de la libro mi ekkomprenis, ke ĝi valoras disvastiĝon ankaŭ per aliaj lingvoj, precipe per Esperanto. Tial mi tuj petis la kopirajton por la esperanta kaj la ĉeĥa eldonoj esperante, ke tio estos mia bela donaco por Martin okaze de lia jubileo.

La Esperanto-versio en la traduko de Jozefo Horvath (brila, laŭ la esprimo de ambaŭ provlegantoj, Uwe Stecher kaj Carlo Minnaja) jam pretas; la verŝajna eldondato estas iam ene de aprilo. Ankaŭ por la ĉeĥigo mi ĵus trovis tradukonton, la germaniston kaj esperantiston Stanislavon Štoček, sed lia traduko estas nur en la starta etapo.

La lanĉo de la menciita libro de Martin Stuppnig, kune kun alia novaĵo de KAVAPECH, la verko de Sabine Dittrich *Heredantoj de silentado* elgermanigita de Henryk Wenzel, okazos dum la Germana Esperanto-Kongreso en Munkeno la 15an de majo. La lanĉon persone partoprenos ambaŭ aŭtoroj.


De Munkeno Martin pluveturos rekte en Bulgarion al Varna, kie li, honora membro de IFEF, partoprenos la Internacian Fervojistan Kongreson.

Fine de tiu mia artikoleto mi deziras al mia proksima amiko, eĉ Esperanto-patro Martin Stuppnig firman sanon kaj ankoraŭ multajn agrablajn travivaĵojn: kaj ene de Esperantujo, kaj ekster ĝi.

*Teksto kaj foto: Petr Chrdle*

## Baptiĝis du libroj rilate Esperanton

Vera hazardo kaŭzis, ke la du unuaj ĉi-jaraj libroj eldonitaj de mia eldonejo KAVA-PECH rilatas al Esperanto, kaj ke ambaŭ mi ricevis el la presejo samtage.



Ĉe la unua la rilaton al Esperanto montras jam ĝia titolo: *Esperanto od A do Z* (Esperanto de A ĝis Z). Temas pri lernolibro bazita sur la antaŭa *Esperantem za tři měsíce* (Per Esperanto post tri monatoj), tial mi tute prave indikis kiel duan aŭtorinon mian edzinon Stanjo, kun aŭtorinon de la unua, malgraŭ tio, ke ŝi forpasis jam antaŭ pli ol 17 jaroj. La lernolibro estas amuze ilustrita de Pavel Rak. En la reto alireblas senpage (kaj sen neceso registriĝi) ekzercoj al la lernolibro kaj pliaj didaktikaj lernhelpiloj ĉe [www.kava-pech.cz/procvicujisesperanto](http://www.kava-pech.cz/procvicujisesperanto). La lernolibro kaj precipe la datenoj en la reto estas kolektiva laboro, pri kio mi jam skribis en Starto antaŭe.

Ĉe la dua libro la rilato al Esperanto estas iom kaŝita: Temas pri rakonto de Tivadar Soros pri la fuĝo el la kaptitejo en Siberio post la unua mondmilito kaj la suferplena traĵo de la tajgo, la siberia praarbaro. La verkon tradukis el la Espe-

ranto-originalo Jindřiška Drahotová. La aldonajn tekstojn el la angla eldono (temas pri antaŭparoloj de ambaŭ filoj de la aŭtoro kaj pri postparolo kun multaj klarigaj notoj verkita de la tradukinto en la anglan kaj editoro de la verko Humphrey Tonkin) enĉeĥigis Marek Blahuš.



Miroslav Hruška legas recenzon de Marek Blahuš

Por fari la informon kompleta: La enmetitan mapon de la vojo de la robinsonoj preparis Karel Votoček kun sia neesperantista kolego, la libro estas kompletigita per mallonga fabelo de la sama aŭtoro „La plej justa juĝo“ kaj la libron bele ilustris Mirka Tomečková.

La lanĉon de ambaŭ libroj mi organizis kunlabore kun la Unio de Ĉeĥaj Interpretistoj kaj Tradukistoj (JTP) en ties sidejo centre de Prago la 15an de februaro. Inter proksimume 70 ĉeestantoj estis





Verda Stacio prepariĝas por la rekta elsendo (Pavol Kaščák, Rostislav Čubok kaj Markéta Wilkus)

ankaŭ multaj esperantistoj. La lanĉon akompanis en apuda ĉambro ekspozicio de vendeblaj eldonaĵoj de KAVA-PECH kun porokazaj rabatoj.

Pro iniciato de Pavol Kaščák (kiun mi danke akceptis) partoprenis la skipo de Verda Stacio kun sia teknika ekipaĵo. Do ĉiuj interesiĝantoj, kiuj ne mem povis ĉeesti, povis spekti la tutan aranĝon en rekta elsendo. Kaj Pavol eĉ promesis, ke li kompilos de tio iun maksimume duonhoran mallongigon kun Esperanto-subtitoloj, kio do povos esti interesa ankaŭ por eksterlandaj esperantistoj.



La protagonistoj de la bapto. De maldekstre Pavel Rak, Petr Kautský, Tomáš Břicháček, Mirka Tomečková, Jindřiška Drahotová kaj Petr Chrdle

Laŭ la kutimoj de la ĉeĥa libromerkato ni nomis la aranĝon metafore „bapto“ de la libroj, kaj ili eĉ havis du baptopatrojn,

kiuj bondeziris al ambaŭ libroj sukceson ĉe la legantoj. Ili estis Tomáš Břicháček, la prezidanto de Praga Esperanto-klubo, kaj Petr Kautský, sekretario de JTP.



Granda intereso estis pri la subskriboj de P. Rak, kiu al ĉiu desegnis en la libron iun bildon

Mia amiko kaj „inspirologo“ (*nápadolog*) Petr Jachnin, kaptita de alia verko de la sama aŭtoro, *Maškaráda kolem smrti* (Maskerado ĉirkaŭ la morto), kiun mi eldonis antaŭ du jaroj, post kiam li aŭdis, ke mi eldonos plian verkon de T. Soros, proponis al mi, ke li organizos aldonan bapton de ĝi, nur por la invititaj amaskomunikiloj - por ke li helpu enmerkatiĝi la interesan libron. Por tiu celo li elektis kiel baptopatrinon sian amikino kaj konatan ĉeĥan reĝisorinon Irena Pavlásková, kies plej lasta filmo estas *Fotograf* pri la fama fotisto Jan Saudek. Tiu dua lanĉo okazis la 17an de februaro en la praga palaco Adria.

Mi volas esprimi publikan dankon al ĉiuj nomitaj amikoj.

*Petro Chrdle*  
*Ĉiuj fotoj de Luděk Neužil*

Ambaŭ libroj estas aĉeteblaj en ĉeĥaj librovendejoj, aŭ rekte ĉe la eldonejo [www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz) - kaj baldaŭ en la libroservo de ĈEA. La prezo de Esperanto de A ĝis Z estas 220 Kč, de Robinsonoj en Siberio 154 Kč."

# 10-jariĝo de E@I: projektoj, defioj, sukcesoj

*Libere laŭ Matthieu Desplantes*

Jen eta superrigardo pri la agado de E@I ekde ties komenco ĝis nun (14-a de novembro 2015), omaĝe al la 10-jariĝo de la fondo de la organizo kiel memstara neregistara organizaĵo:

## Historio skize

- 1999 – fondo de neoficiala laborgrupo “Esperanto@Interreto” (E@I)
- 2000 – unua trejnseminario
- 2002 – lanĉo de [lernu.net](http://lernu.net)
- 2005 – (14.11.) – oficiale agnoskita internacia neregistara organizo (en Slovakio): E@I (Edukado@Interreto)
- 2007 – unua [SES](http://SES) (Pribylina, Slovakio)
- 2009 – unua EU-projekto: retejo [Slovakie.eu](http://Slovakie.eu) (peresperanta, ne poresperanta projekto)
- 2010 – unua staĝanto per programo Erasmus
- 2010 – unua [KAEST](http://KAEST), organizita de E@I
- 2011 – propra oficejo en Partizánske (2013 – ŝanĝo de la oficejo al pli granda)
- 2013 – unua volontulo per EVS
- 2015 – 10-a SES (Martin, Slovakio)

La agado de E@I konsistas el kelkaj partoj, foje forte ligitaj, foje tute sendependaj. La projektojn kaj la agadon eblas dividi al: organizado de aranĝoj, kreado de edukaj retejoj, eldona agado, ceteraĵoj.

**E@I-seminarioj:** Inter la jaroj 2000 – 2006 okazis entute ok trejnseminarioj.

**SES:** Ekde 2007 ĝis 2015 okazis jam 10-foje la **Somera Esperanto-Studado** (en la jaro 2014 ĝi okazis eĉ 2-foje, unu en Slovakio, alia en Rusio).

**KAEST:** Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (2010, 2012, 2014).

**SAT-kongreso:** La teamo de E@I helpis okazigi la SAT-kongreson en la urbo Nitra en la jaro 2015. Kun SAT ĝi kunlaboris ankaŭ pri la kreo de la **reta versio de PIV**, retejo vortaro.net.

**UK 2016:** E@I ankaŭ aktive partoprenas en la organizado de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos julie 2016 en Nitro, Slovakio.

## Libroj, kompaktdiskoj kaj DVD-j:

1. KD *lernu!* (2003)
  2. libro *Manlibro pri instruado de Esperanto* (2005, kunlabore kun ILEI)
  3. DVD *Esperanto Elektronike* (2006, 2011)
  4. libro *Vikipedio – praktika manlibro* (2007, aŭtoro Yves Nevelsteen)
  5. libro *Komputeko* (2008, Yves Nevelsteen)
  6. KD *Esperanto* (2008, 400 000 ekzempleroj aperis en *Gazeta Wyborcza* antaŭ la 94-a UK)
  7. libro *Vikipedio por vi* (2008, Ziko van Dijk)
  8. DVD-video *Esperanto estas...* (2008, reĝisoro Rogener Pavinski)
  9. broŝuro *Malkovru Esperanton* (2009, iniciatita de Hokan Lundberg, jam en 10 lingvoj)
  10. libro *Detala gramatiko de Esperanto* (2010, aŭtoro Bertilo Wennergren)
  11. libro *Modernaj teknologioj por Esperanto* (2011, prelegkolekto de KAEST 2010)
  12. DVD *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono 2012*
  13. libro *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj* (2013, prelegkolekto KAEST 2012)
  14. DVD *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono 2014*
  15. libro *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon* (2015, prelegkolekto de KAEST 2014)
  16. libro *toki pona en 76 ilustritaj lecionoj* (2013, 2014, lernolibro de la lingveto toki pona, lernebla pere de Esperanto, 2 eldonoj)
  17. libro *Lingvomanio* (2015, Proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj de Eŭropo)
- Tre ŝatataj estas ankaŭ diversaj Esperantaj T-ĉemizoj, insignoj aŭ glumarkoj.



## Projektoj retaj, Esperanto:

- [www.lernu.net](http://www.lernu.net)
- [www.vortaro.net](http://www.vortaro.net)
- [www.komputeko.net](http://www.komputeko.net)
- [www.bretaro.net/](http://www.bretaro.net/)
- <http://dvd.ikso.net>
- <http://drakoj.ikso.net/>
- <http://ridejo.ikso.net/>
- <http://apetito.ikso.net/>
- <http://eo55.ikso.net/>
- <http://blogu.ikso.net/>
- <http://kantaro.ikso.net/>

## Aliaj lingvoj:

<http://slovaque.eu/> (13 lingvoj, inkluzive de EO)  
<http://deutsch.info/> (15 lingvoj, EO)  
<http://tokipona.info/> (kurso kun ekzercoj, EO)  
<http://speaklearn.eu/> (20 lingvoj, EO)  
<http://lingvo.info/> (21 lingvoj, EO)  
<http://mluvtecesky.net/> (5 lingvoj)  
<http://espa2.eu/> (11 lingvoj)  
<http://monda.eu/> (10 lingvoj, EO)  
<http://cyberhelp.eu/> (8 lingvoj)

## Neaktualaj/Neaktivaj/Dormantaj:

Malnova versio de lingvo.info ■  
aktuale.info (atendas renovigon) ■  
interkulturo.info ■ nitobe.info

**Staĝantoj:** de 2010 ĝis 2013 laboris en E@I entute 14 staĝantoj el 6 landoj (8 per Erasmus, 1 per Campus Hungary, 5 sen stipendio).

**Volontuloj:** Nome de EVS (Eŭropa Volontula Servo) E@I akceptas en sia oficejo en Partizánske volontulojn (18-30 jaraj) por labori pri diversaj projektoj. Ĝis nun 9 volontuloj el 9 landoj: Matthieu Desplantes (Francio), Kaan Kızılgün (Turkio), Rasmus Åkerlund (Svedio), Matthias von Laer (Germanio), Anna Liszewska (Pollando), Alberto Muzzu (Italio), Elena Ĥusanova (Rusio), Oleh Rohalskyj (Ukrainio), Robert Nielsen (Irlando)

**Oficejo:** Ekde la 1-a de julio 2011, danke al subteno de la urbo Partizánske kaj ties urbestro Jozef Božik, E@I disponas pri propra oficejo en ĝia urbo-centro. En junio de 2013 estis ŝanĝita loko de oficejo ene de la sama konstruaĵo, la oficejo iĝis pli granda kun 100 m<sup>2</sup> kaj du ĉambroj.

**Kampanjoj:** E@I lanĉis monkolektajn kampanjojn por eldoni la DVD-jn (*Esperanto Elektronike, Esperanto estas...*) kaj por aperigi retan version de PIV.

**Kunlaboro:** E@I tre regule kunlaboras kun diversaj organizoj, kaj Esperantaj, kaj ne-Esperantaj, ekz. kun la firmao Studio Gaus, kiu nun ĉefprogramas ĉiujn grandajn edukajn projektojn, kaj la posedanto de ĝi, Jevgenij Gaus, ja estis antaŭa aktivulo en E@I kaj TEJO.

**EFS:** La plej granda subtenanto de nia agado poresperanta estas sendube “Esperantic Studies Foundation”, sen kiu multaj el niaj projektoj tute ne ekzistus.

**EU:** Ĉiuj grandaj edukaj retejoj (krom lernu.net) aperis danke al la subteno de Eŭropa Komisiono kaj EU entute. Ekde la jaro 2009 E@I jam regule partoprenas projektojn, subtenitajn de EU, kaj danke al tio entute povas labori kaj antaŭ-enigadi siajn celojn.

**Pli da detaloj pri E@I:** [www.ikso.net](http://www.ikso.net)

## Duolingo

(*ne estas projekto de E@I, tamen simila*)

Al la Esperanto-kurso por anglalingvanoj ĉe la internacia kursaro Duolingo aliĝis jam **320 000 kursanoj**. Preparata estas Esperanto-kurso por hispanlingvanoj.

<https://www.duolingo.com/courses/all>

# La 14a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken

27.12. 2015 - 3.1. 2016

Ĝi okazis samtempe kun la Novjara Internacia Semajno (NIS) ĉe la franca limo, en la urbo Saarbrücken jam la 4-an fojon. Partoprenis ĝin kaj kunfestis pluraj gejunuloj kaj multaj junaj familioj kun infanoj, inter kiuj abundis denaskuloj. La unuan vesperon la ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven bonvenigis nin prezentante al ni la prelegantojn kaj la kompletan semajnan programon. Poste ni ĝuis tipajn manĝaĵetojn kaj trinkaĵojn, kiujn la partoprenantoj alportis el diversaj landoj por gustumigi.



Agrable estis renkonti kaj babili kun malnovaj geamikoj kaj konatiĝi kun novuloj.

Al la evento aliĝis pli ol 210 esperantistoj el dudeko da landoj. La partoprenantaro konsistis el beboj, infanoj, gejunuloj, adoleskuloj kaj pli aĝaj personoj, inter kiuj la plej aĝa estis 92-jara sinjoro, kiu eklernis Esperanton surloke. Por infanoj oni pretigis tre varian lud-programon kaj manlaborajn atelierojn, spektaklojn, sportajn kaj tablo-ludojn kaj multajn aliajn aktivaĵojn, inter kiuj ne mankis ĵonglado kaj

improviza teatro. Ekstere oni kradrostis sur fajro bananojn kun ĉokolado. La infanajn programerojn prizorgis Nicky Janssen, Christoph Frank kun sia edzino Ines kaj multaj unuopaj gepatroj. Ili prezentis spektaklojn kaj aliajn distraĵojn por ĉies ĝojo. La infanoj kaj gejunuloj amuziĝis laŭplaĉe. La plej malgrandaj dumtage entuziasme spektis Mazi-kurson kaj vesperaj piĝamaj rakontoj de Nicky Janssen ravis ĉiujn etulojn.

Samtempe okazis diversaj kursoj por komencantoj, progresantoj kaj serio de lingvaj temoj kun diversaj detaloj pri gramatiko kun amuzaj ekzercoj kaj enigmoj. Oni lernis ankaŭ dum la promenado en la naturo. Dum diversaj debatoj oni pridiskutis kiaj E-kursoj kaj E-instruistoj estas bezonataj, kiel allogi kaj varbi gejunulojn kaj interesatojn al E-asocioj?

La programo estis vere riĉa kaj ĉiu povis trovi ion allogan por si mem. Okazis interesaj prelegoj, diskutrondoj, laborgrupoj, atelieroj, abundis muzikprogrameroj, ĉendancado, lernado de argentina tango, manlaboroj, ekskursoj. Ĉiuvespere estis prezentitaj subtitolitaj filmoj. Oni raportis pri la 100-a UK en Lillo.

Per kelkaj bildprezentoj ni povis vojaĝi de Nepalo al Kilimanĝaro, pilgrimadi al Kompostelo, admiri kamenojn de feinoj kaj ĉirkaŭi la tutan mondon bicikle.

Ni ricevis informojn pri Duolingo, pri mirakloj de la pluvarbaro, pri ciferigado kaj ekonomio, pri amaskomunikilaj rilatoj kaj lingvolernejoj, pri menskalkulado, pri budhisma meditado kaj ĝia filozofio, pri socia kaj politika situacio de la indiĝenaj lingvoj en Afriko, pri Israelo, pri Varsovia vento kaj pri Ar-

kones. Eblis spertiĝi en tradukado sub gvido de Brian Moon kaj István Ertl. Pri la situacio en Sirio ni rekte eksciis de du rifuĝintoj loĝantaj nuntempe en Germanio. Ili parolis pri siaj spertoj, aktualaĵoj, emocioj kaj aventuroj.

Tre interesa estis serio da diskutoj, kiujn reĝisoris Jesper Jacobsen. Temis pri: “Eŭropo - unio de solidareco ĝis kiu punkto?”, “Kiel protekti tutmondan heredaĵon, “Energi-politiko kaj klimata ŝanĝiĝo”, “Enmigrado en Eŭropan Union: ĉu krizo aŭ renaskiĝo?”, ”La reveno de naciismo en Eŭropo”. Interesis diskutoj kaj spertoj pri familia edukado de infanoj laŭ psikologia vidpunkto.

Eblis gimnastiki, triki, feltumi, kanti, danci kaj alimaniere amuziĝi. Bone funkciis la libroservo de FEL. Post la vesperaj programoj ni babilis en trinkejo ĉe vino, biero kaj aliaj alkoholaj aŭ senalkoholaj trinkaĵoj ĝis malfruaj nokthoroj. Ne okazis la tuttaga ekskurso, sed la partoprenantoj ĝuis plurajn promenojn enurbajn kaj en la naturo. Iuj ĝuis naĝadon en la urba naĝbaseno.

Post la finiĝinta alia jarfina aranĝo - Internacia Festivalo, la Internacia Vintra Universitato (IVU) transiris al NR, kie okazis la 9-a sesio de fakaj prelegoj. Temoj de la prelegoj estis: “Vivo sur foraj planedoj, Amo, Revolucio de Einstein, Nanoplanedoj”. Ĉe la fino la ĉeestantoj trapasis ekzamenon kaj la sukcesintoj akiris AIS-ateston.

Dum la vesperoj ni havis okazon spekti pupteatraĵon kun magiaĵoj de Christoph Frank, ĝui koncerton de baladoj pri amo kaj morto de Birke kaj Bertilo, aŭskulti romantikajn kanzonojn de Ĵomart kaj Nataŝa, kvarvoĉan ĥoron sub gvido de Jesper Jacobsen. Estis organizitaj kvizo Risko kaj diversaj eksperimentoj pri

fiziko, kie oni devis diveni - kio okazos?

La Silvestra vespero komenciĝis per bufeda manĝo, poste estis disdonataj atestiloj al partoprenantoj de la IVU-ekzamenoj. Noktomeze ekstere eksplodadis piroteknikaĵoj, kiel bonvenigo de la Nova Jaro 2016 kaj interne ni tostis bondezirante ĉion plej bonan kaj dancis ĝis la mateniĝo.



La partoprenantoj de la 14-a NR ĝuis buntan program-oferton kaj amikecan etoson. Dum la lasta adiaŭa vespero pluraj kontribuis al varia programo ne nur per muziko kaj kantado. Oni sukcesis venigi ĵurnalistojn kaj poste aperis artikoloj pri la aranĝo en la germana kaj franca gazetoj kaj televidelsendo en TV8 Moselle-Est.

*Liba Gabalda*

## **FESTOTAGOJ HAVÍŘOV**

### **17.-19.6.2016**

Omaĝe al 60jariĝo de la loka klubo  
Sabate solena programo, urbotrarigardo,  
societa vespero.

Dimanĉe Grimpado al Granda Ĉantorio aŭ alia ekskurso (ekz. kastelo en Karviná aŭ arkeoparko Chotěbuz). Por interesitoj oni povas prizorgi loĝadon kaj manĝojn.

Limdato por nedevontigaj aliĝoj:

30.4.2016. Aliĝintoj ricevos konkretan oferton kaj detalan programon.

Kontakto: Klub esperantistů,  
Zdeněk Heiser, MKS Havířov, Hlavní třída  
31a, 736 01 Havířov retpoŝte:

[zd.heiser@post.cz](mailto:zd.heiser@post.cz)

# La 43-a LINGVA SEMINARIO

en Skokovy, 11.-17.4.2016



PROGRAMO: antaŭtagmeze lingvo-instruado kaj lingvo-praktikado, posttagmeze ekskursoj, promenoj, rilakso, manlaboraj atelieroj, vespera amuziĝo

PREZO: proksimume 420,- Kč tage por tranokto kaj 3 manĝoj. Organiza kotizo 100 – 200,- CZK – laŭ daŭro de la restado. Oni pagas surloke. Eblas ev. veni ankaŭ por malpli da tagoj!

Informoj: Jindřiška Drahotová,

[drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz),

tel. (+420) 720 652 320



## Ĵus aperis

Legolibreto XII.

Perfektigu antaŭ UK Nitra! Nur 50 Kč

Ĉe J. Drahotová:

[drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz)

## Seulo gastigos la 102-an UK

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj.

## Renkontiĝo en Svitavy 760-a datreveno de la urbo

Vendrede la 20-an de majo 2016:

**14-a horo** renkontiĝo en la muzeo

**16-a horo** rigardo de historiaj trajnoj kaj drezino kun pedala movsistemo

**17-a horo** vernisaĝo pri la historio de trajnoj

**20-a horo** Muzea nokto kaj teatraĵo **El la vivo de insektoj** (teatro DOMA)

Sabate je la 8,20 h per vaportrajno al Polička, posttagmeze kultura programo en Svitavy sur la placo de Paco.

Informoj pri tranokto:

[dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz) aŭ

tel. 604 377616

## Sarajevo

### Urbo-kandidato por UK 2018

La urbo, kie kuniĝas la Oriento kaj la Okcidento, la multkultura metropolo de Bosnio-Hercegovino. La ĉefurbestro prof. Ivo Kromšić kore invitas UEA kaj la tutan esperantistaron kongresi en tiu ĉi urbo.

## AMO en Nepalo

Aktivula Matruĝo (AMO), kurso de ILEI, okazis en februaro 2016 en la Nepala urbo Katmanduo por 35 junuloj, novuloj kaj pioniroj.



## Esperanta Numismatiko

estas gazeto de Esperanto-Numismatika Asocio, kies reta versio estas distribuata senpage por registrintoj ĉe [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be).

## Lančov 2016

**1-a etapo** - ne okazos

**2-a etapo** - 17.7.-30.7.2016

**3-a etapo** - 31.7.-12.8.2016

Renkonto de eksaj tendaranoj 12.-14.8.2016

### Prezoj por la 2-a/3-a etapo:

Esperanto (ĝis 15 jaroj) 3790/3670 Kč

Esperanto (super 15 jaroj) 3990/3870 Kč

Aliaj lingvoj (ĝis 15 jaroj) 4090/3970 Kč

Aliaj lingvoj (super 15 jaroj) 4290/4170 Kč

La 3-a etapo estas je unu tago pli mallonga, ĉar tiam okazos la renkonto de la eksaj tenaranoj.



**Kontaktoj:** Lenka Lacinová, tel. 604 940 663, retpoŝto: [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz), Esperanto PO BOX, 674 01 Třebíč, [www.set-lancov.cz](http://www.set-lancov.cz).

### Bankokonto:

**Por Ĉeĥio:** 2300386901/2010

**Por Slovakio:** 2300386901/8330

**Variigebla simbolo:** naskiĝdato de kursano (ekz. 19950214 = 14.2.1995)

## Kiam ekfloras la migdalarbo

Poezia libro de Triesta Esperanto-Asocio eldonita en kadre de projekto *La patrina lingvo, je la radikoj de l' identeco* kiel kontribuo al subteno de dialektoj, ĉi-kaze la triesta. Ĝi subtenas la 21-an de februaro dediĉitan al respekto kaj subteno de la lingva kaj kultura diverseco tra la mondo.  
Elda Doerfler



## Tradicia marcipano

Jam la okan fojon la Esperanto-klubo en Svitavy kunlabore kun la geedzoj Vyšínka el Vracov aranĝis Marcipanan Kristnaskon en Esperanto-Muzeo.



La 6-an de decembro 2015 jam duonon antaŭ la naŭa la eta Samuel el Zaječí apud Břeclav senpacience atendis komencon de modlado el marcipano. Kiam la aranĝo je la 9-a precize komenciĝis, ĉiuj tabloj jam estis plenaj. Samuel apartenis al aliaj 108 infanoj, kiuj sub gvido de Anjo Vyšínková kreis "malicajn birdojn", pingvenojn aŭ aliajn figuretojn el marcipano.



Ŝi zorge sekvas, kiuj bestoj aktuale furoras, por akiri dankon de la infanoj. Summe ili modlis 322 bestojn. Krom siaj modeloj la infanoj forportas hejmen ankaŭ memorfoliojn por kolorigi ilin. Ĉi tiu aranĝo estas la plej multe vizitata el ĉiuj aranĝoj en nia muzeo.

Libuše Dvořáková

## Kunlaboro kun eksterlando kreskas

Sabate la 6-an de februaro 2016 okazis membrokunveno de Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy. La membroj taksis, en kio ili estis pasintjare sukcesaj.



En aprilo ni organizis regionan renkontiĝon, en kies kadro ni vizitis kaj al la vizitantoj el la tuta respubliko prezentis la urbon Moravská Třebová. En junio ni aliĝis al programo de la Muzea Nokto en Ottendorfer-domo. Samtempe ni gastigis dekon da tagoj esperantistinojn el Germanio. Julie reprezentantoj de la klubo partoprenis en la 100-a UK en Francio, kie klubano salutis nome de Ĉeĥio kaj propagandis la urbon Svitavy kaj Esperanto-Muzeon en internacia Esperanto-foiro. En aŭgusto ni gastigis organizantinojn de film-konkurso de Ĉina Radio Internacia, redaktorino Zhang Ping, konatan sub la nomo Ĝoja. En Svitavy gastis grupo de 12 francaj esperantistoj, kun kiuj ni entreprenis ekskursojn. Post ilia forveturo ni komencis prepari novan ekspozicion „Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo“. Post vernisaĝo ni gastigis du ĉinajn esperantistinojn Wu Hanping kaj Wu Liu el provinco Kanton. Unu vesperon okazis prelego pri Ĉinio, la sekvan vesperon Wu Hanping demonstris ceremonion pri teo-preparado,

kiel ĝi estas instruata en ĉina universitato. Ambaŭ junulinojn ni poste akompanis al kastelo Bartošovice apud Nový Jičín, kie ĉiujare realiĝas Esperanto-kursoj. En oktobro ni aranĝis ekskurson al folklor-kostuma kermeso en Vracov kaj al la kastelo Milotice. Kiam ni revenis, en Svitavy atendis nin vizitantoj el Hungario. Novembre enkadre de aranĝo „silka vojo“ ni plenigis enketilon pri kunlaboro de nia klubo kun la ĉia asocio. Kiel dankon ĉiu klubano ricevis ĉinan novjaran gratulokarton. La esperantistan jaron ni finis kiel ĉiujare en Silvestro en Česká Třebová. Ĉi-foje kiel klubo ni estis plej sukcesaj. La geedzoj Bobrik gajnis la unuan premion en scio-kvizo, Dagmar Martinková gajnis duan premion en konkurso „Ne estas saluto kiel saluto“.

Nia laboro estas senpere ligita al Esperanto-Muzeo, kiu iĝis centro de esperantista movado en la tuta respubliko. Ni kunlaboros en organizado de Antaŭkongresa Ekskurso al nia urbo por ĉ. 50 partoprenantoj de la 101-UKo. En la unua tago de tiu kvintaga aranĝo vizitos nin pli ol dekmembra delegitaro el Ĉinio, frunte kun vicdirektoro de radiostacio ĈRI kaj de direktorino ĉe Universitato de Teo-trinkado. La klubo intencas registri mallongan filmeton, kiu devus prezenti inaŭguron de Ottendorfer-domo fine la 19-a jarcento, kurtan dokumenton pri la konstruaĵo kaj pri Esperanto-Muzeo. Interesiĝantoj pri filmado venis en la muzeon en historiaj kostumoj. La filmon ni produktos kunlabore kun redakcio de Verda Stacio, kiu distribuas siajn verketojn en la tutan mondon ĝuste pere de CRI. Kompreneble ni ankoraŭ ne scias, kiuj aliaj eksterlandaj vizitoj nin surprizos en lasta momento.

*Libuše Dvořáková*

## EK Přerov

Merkrede la 16-an de decembro 2015 realiĝis tradicia antaŭkristnaska kunsido de esperantistoj EK Přerov kaj de aliaj esperantaj rondetoj el Olomouc, Hranice, Prostějov. Partoprenis 35 membroj. La plej juna partoprenanto estis 8-jara Alešek - nepo de samideano Václav Nosek, kiu kun Jan Duda el EK Olomouc kreis muzikan trion, kiu por ĉiuj ludis entuziasmige belegajn kristnaskajn kantojn kaj folklorajn kantojn. La ĉefaj gastoj estis ing. Daniela Novotná kaj verkistino Lenka Chalupová el magistrato de Přerov. Lenka Chalupová rakontis al ni pri siaj verkistaj komencoj kaj pri eldonitaj libroj. Ŝi rakontis ankaŭ pri siaj temoj por libroj. Ŝia plej nova libro estas "Ledové střepey" (spliteroj de glacio).



Antaŭ la fino ŝi malkaŝis, ke en la 4-a klaso de elementa lernejo ŝi lernis Esperanton kaj sub Kristnaskan arbon ŝi deziris Esperanto-vortaron, kio al ŝi plenumiĝis. Ŝi montris foton de la donacoj, inter kiuj estis ankaŭ la vortaro. Post agrabla prelego denove ekludis la muzikistoj kaj ekestis la ĝusta antaŭkristnaska senzorga tempo. Nur la neĝo mankis al ni, sed por kelkiuj ĝi estis bona inspiro por kristnaska donaco. Validas ja, ke **libro estas la plej bona amiko de homo**.

*Antonín Krejčíř  
EK Přerov*

## EK Prostějov

*Esperanto Klubo Prostějov, z.s.* estas nova nomo de la klubo ekde la 1-a de decembro 2015.



La 28-an de decembro 2015 la klubo okazigis Silvestran solenon kun gitarludado kaj kantado kaj gastoj el Přerov, Olomouc kaj Hranice.

## EK Olomouc

La 20-an de decembro 2015 en Olomouc okazis Kristnaska renkonto kun 14 ĉeestantoj.



La geedzoj Jelínek rakontis pri siaj vojaĝoj, poste ĉiuj kantis Kristnaskajn kantojn akompanate de violono de Jan Duda.

## EK Vítkovice

Kristnaska vespero 17.12.2015



Vizito el Bialsko-Biala 17.2.2016



## Esperanta Silvestro en Česká Třebová

Esperanta Silvestro en Česká Třebová havas jam longan tradicion kaj estas tre ŝatata. Tion pravas la fakto, ke ne mankas eksterlandaj gastoj. Ĉi-jare kun 53 partoprenantoj el 14 lokoj de Ĉeĥio festis la jarfinon ankaŭ esperantistoj el Germanio kaj Nederlando.



La programo estas ĉiam riĉa kaj tre pena por la organizantoj. Programestrino de la vespero estis Jana Křížková. La organizantoj proklamas novajn konkursajn temojn – ĉi-foje „Ne estas saluto kiel saluto“. Ĉiu konkursanto traktis la temon laŭ siaj imagoj. Multfoja venkinto de tiuj konkursoj estas Kvido Janík el Šumperk. Ankaŭ ĉi-foje li venkis per prezento de salutkartoj el 20 landoj de la mondo. Duan lokon okupis Dagmar Martinková el Svitavy kun versa saluto, tria estis la klubo de Pardubice.

Kiel ĉiam ni rompis nian kapon super kvizo testanta niajn sciojn. La demandoj intence erarigaj koncernis ĉiujn fakojn. Feliĉe ni povis elekti el proponitaj respondoj. La unuan lokon en la kvizo gajnis geedzoj Bobrik el Svitavy, kiuj la Silvestron ĉeestis unuafoje, la duan lokon okupis la klubo de Pardubice kaj la trian lokon sinjoro Kukla el Prago. Ankaŭ mazurko kaj labado ne mankis. Por la dancantoj muzikis Vojta Slavíček el Šumperk.

*Libuše Dvořáková*



## Fuzo en Brno

La 3-an de februaro 2016 en la klubejo en la strato Starobrněnská renkontiĝis membroj de la *Societo por internacia lingvo Esperanto en Brno* kaj voĉdone nuligis sian organizon. Poste sekvis jar-kunveno de *Klubo de Esperantistoj Brno* kaj voĉdone akceptis la Societon al la Klubo. Fine la tria kunveno de la rezulta organizo decidis, ke la klubo portos nomon *Klubo de Esperantistoj Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio*.



*Danko al s-ino Věra Podhradská pro ŝia tutviva laboro en la Klubo kaj Societo*



*Zdeněk Závodný legas ekonomian raporton*



*Danko al s-ro Zdeněk Závodný, multjara kluba kasisto*

Estis elektita nova kluba komitato: Miroslav Malovec (prezidanto), Milan Kolka (vicprezidanto), Oldřich Arnošt Fischer (sekretario), Bohumila Trzosová (kasistino kaj eldona fonduso).



*La klubanoj gratulis ankaŭ al Miroslav Hruška pro akiro de inĝeniera titolo kaj dankis pro laboro en la kluba komitato.*

-mm-

Fotoj Josef Vojáček

## Karel Havlíček Borovský (1821-1856)

### La 160-a datreveno de forpaso de la aŭtoro de *La bapto de caro Vladimir*

La 31-an de oktobro 1821 naskiĝis en familio de komercisto kaj eksa edukistino de nobelaj infanoj en bohemia vilaĝo Borová apud tiama Německý Brod (nuntempa Havlíčkův Brod) Karel Havlíček. Li estis la dua infano de la familio, ĉar lia frato du tagojn post sia naskiĝo mortis. Ankaŭ komenco de vivo de Karel estis drameca, ĉar li longtempe post naskiĝo ne spiris kaj oni devis lin revivigi. Verŝajne pro tio li dum sia infaneco estis malfacile edukebla.

Alia drameca situacio okazis, kiam li estis 3- aŭ 4-jara. Lia patro hejme nutrigis siajn kolombojn per kuiritaj terpomoj. Malgranda Karel malfeliĉe tretis sur terpomon, glitis kaj rompis sian dekstran piedon. Li devis kuŝi tri monatojn ĉe parencoj, kiuj zorgis pri li, en la urbeto Příbrav.

En la jaro 1826 kvinjara Karel eklernis en baza lernejo en Borová. Li havis bonan instruiston (Antonín Líněk) kiu baldaŭ eksciis, ke Karel, kiu ofte estis obstina, neobeema kaj eĉ agresema, estas talenta lernanto. Krom tio Karel havis du bonajn adoltajn amikojn. Romkatolika vikario Jan Brůžek kaj subparoĥestro Serbousek gvidadis la knabon tra la naturo.

En la jaro 1830 Karel ekstudis en la urbo Jihlava, por ellerni la germanan lingvon. Li ne sentis tie bone, ĉar samklasanoj mokis lin kaŭze de lia malbona scio de la germana lingvo kaj direktoro Oller ne ŝatis ĉeĥojn. Tial Karel en la jaro 1832 foriris en mezlernejon (Německý Brod). En la mezlernejo, kie instruis monaĥoj el proksima monaĥejo de Želiv, patriota pastro Václav Divok

kuraĝigis la studentojn skribi ĉeĥlingvajn versojn kaj prozon. Karel Havlíček verŝis, sed nur germane. Li ne estis sukcesa studento – nur antaŭ fino de studado li pliboniĝis danke al memstudado.

Post fino de la mezlerneja studado Karel foriris en Pragon, por prepari sin du jarojn por universitata studado. Tiam li estis tre ŝparema, ne vizitadis gastejojn, ne trinkadis bieron, por havi monon por aĉetado de lernolibroj, kaj fervore li studis. Verŝajne tiam li tralegis verkojn de profesoro Bernard Bolzano (1781-1848), kiu estis bonega natursciencisto, pedagogo kaj filozofo. Brava viro, al kiu romkatolikaj eklezianoj riproĉis 112 herezojn, ĉar li proksimiĝis al la Dio danke al sia logiko kaj sincereco, havis la sloganon „Kredi sen la kredo!“ Li instruis, ke la religio kaj la kredo estas utilaj, ĉar plibonigas animojn de homoj. En sia libro „Pri la plej bona ŝtato“ (1831, „Das Büchlein vom besten Staate“) li proponis idealan aranĝon de ŝtato. Bolzano estis devigita forlasi universitaton jam en la jaro 1820, sed liaj opinioj influis multe da studentoj, kiuj lin ŝatis kaj fervore vizitadis liajn prelegojn.

Patro volis, ke Karel fariĝu juristo, sed Karel celis al laboro de pastro, ĉar li volis servi al popolo. En la jaro 1840 Karel Havlíček ekstudis en romkatolika seminario en Klementinum (Prago). Sed tie li baldaŭ eksciis, ke ĉirkaŭ li floras hipokriteco kaj sensenca dresado. Ĉu tio estas taŭga preparado por servo al Dio kaj popolo? Studento Karel en la seminario kritikis la katolikan eklezion, lernis la rusan kaj verŝis ĉeĥlingve.

Post unu jaro li devis fini la studadon kaj neniam fariĝis pastro.

Li ekvolis fariĝi instruisto, tial li lernis diversajn slavajn lingvojn kaj multe vojaĝis, plej ofte piede. Kun siaj amikoj li vagadis tra Bohemio, vizitis Pollandon (Kraków, Nowy Sącz) kaj Slovakion (Kežmarok, Liptovský Svätý Mikuláš). Sed en Prago tiam kiel nun abundis junaj viroj, kiuj ne finis studadon, kaj libera loko de instruisto por Havlíček mankis.

Kiam li en la jaro 1842 vane serĉis laboron en Prago, slovaka kaj ĉeĥa patrioto Pavel Josef Šafařík proponis al li labori en Ruslando. Tiam multe da edukitaj ĉeĥoj en Aŭstrio naive pensis, ke la rusa caro estas bonkorulo kaj volas defendi ĉeĥojn kontraŭ germanoj. Kelkaj homoj eĉ diskutis, ĉu oni ne povus skribi ĉeĥajn tekstojn uzante rusan alfabeton (azbukon). Ankaŭ Karel Havlíček, kiu aldonis al sia nomo la duan familian nomon Borovský (laŭ vilaĝo Borová, kie li naskiĝis), forveturis en Ruslandon kun multe da idealoj. Survoje li devis atendi pasporton en la galicia urbo Lvov. Li loĝis du monatojn ĉe ĉeĥa verkisto Karel Vladislav Zap kaj lernis la polan lingvon. Sed jam en Lvov li observis, ke eĉ inter slavaj nacioj ne ĉiam estas bonaj rilatoj: poloj premis rutenojn, rusoj premis polojn kaj tion utiligis germanoj, kiuj premis ĉiujn slavojn.

La 5-an de februaro 1843 Karel Havlíček Borovský eklaboris en familio de rusa profesoro Ŝevirjev kiel hejma instruisto de lia sepjara filo. La profesoro estis fanatika slavamanto. Havlíček post alveno sentis sin kiel en slava paradizo. Ĉio estis nova por li, ĉio al li plaĉis. Sed diferencoj inter Aŭstrio kaj Ruslando estis grandegaj. Ekzemple servuteco en Aŭstrio estis ĉesigita jam en la jaro

1781 (de Jozefo la 2-a Habsburga la 1-an de novembro 1781), tial generacio de Havlíček jam elkreskis kiel liberaj homoj. En Ruslando la servuteco daŭris ankoraŭ 80 jarojn – ĝis la jaro 1861!

Demokrato Havlíček, kiu falis en vivotantan subĉielan muzeon de feŭdalismo, rigardis, ke rusaj nobeloj kondukas malbone al siaj servutuloj („animoj“). Li eksciis, ke la cara regado estas pli malbona ol regado de Francisko Jozefo la 1-a. Rusaj komercistoj imitis fremdajn kutimojn, sed estis needukitaj. Ili havis multe da mono, sed neniun estetikan senton. Ili edzinoj kaj filinoj estis terure dikaj. Terura estis alkoholismo, kiu estis inter rusoj tre disvastiĝinta. Rusaj soldatoj estis instruitaj de ortodoksaj pastroj, ke se ili falos, ili iros rekte en la ĉielon. Ortodoksaj pastroj servis al siaj propraj interesoj kaj fervore apogis la caron. Havlíček eksciis, ke la caro en Ruslando regas super eklezio kaj la eklezio servas al li kiel al vivanta dio. (Poste Havlíček uzis tiun motivon en sia satira poemo „La bapto de caro Vladimir“.)

En Ruslando Havlíček ekkonis verkojn de granda ukraina, ruse verkanta aŭtoro Nikolaj Vasiljeviĉ Gogol (1809-1852, ukraine: Mikola Vasiljoviĉ Hohol). Profesoro Ŝevirjev ne ŝatis Gogolon kaj atakis lian teatran komedion La Revizoro (ruse: Ревизор) dirante, ke tio estas nur kruda farso, sed Havlíček bonege ekkomprenis opiniojn de Gogol kaj eĉ ĉeĥigis ekzemple liajn rakontojn „La Nazo“ («Нос»), „La Mantelo“ («Шинель») kaj lian romanon „Mortaj Animoj“ («Мертвые души»), kiuj ankaŭ ne plaĉis al liaj gastigantoj.

*Oldřich Arnošt Fischer*  
(daŭgigota)

## EK Písek

Tradicia **Antaŭkrisnaska Renkontiĝo (AnKro)** kun partopreno de gastoj el aliaj regionoj okazis 12.12.2015.

La 7-an Adventan Matineon en la Urba Biblioteko, destinitan ankaŭ por la publiko, partoprenis denove redaktorinoj de du distriktaj ĵurnaloj. En *Písecký deník* sekve aperis artikolo pri la aranĝo. En la biblioteko denove realiĝis eta ekspozicio pri Esperanto-literaturo.

La posttagmezo estis dediĉita kiel kutime al zamenhofa parto, kristnaska programo komponita el kristanaj kaj popolaj tradicioj kaj ĉi-foje ankaŭ al naskiĝtaga antaŭsolenaĵo de Josef Xaver Kobza.



*Kristnaskan tombolon prizorgis "jesuinfaninoj" el EK Pelhřimov*

Meso omaĝe al li kaj solenaĵo kun partopreno de esperantistoj okazis en České Budějovice 27.2.2016. La programo estis filmita kaj publikigita



(vidu Aktualizaĵojn en [esperanto.cz](http://esperanto.cz)).

## GRAVAJ INTERNACIAJ ARANĜOJ EN 2016

2016-04-22/24 **Ŝçeĉina Esp-Printempo**

2016-05-13/16 **GEA-Kongreso** en Munkeno

2016-05-12/15 **PEA-Kongreso** en Lodz

2016-05-21/28 **IFEF-Kongreso** en Varna

2016-06-2/10 **La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj** en Birŝtonas

2016-07-9/11 **La 10-jara jubileo de Herzberg a.H.**

2016-07-16/23 **IJK** en Wroclaw

2016-07-16/23 **SAT-Kongreso** en Herzberg a.H.

2016-07-16/23 **IKUE-Kongreso** en Nitra

2016-07-16/23 **KELI-Kongreso** en Bratislava

2016-07-30/08-6 **ILEI-Konferenco** en Nyíregyháza, Hungario

*Pliaj informoj kaj kontaktoj:*  
en [www.eventoj.hu/Kalendaro](http://www.eventoj.hu/Kalendaro)



## La franca Esperanto-kastelo Grésillon

invitas vin lerni kaj ferii.

■ 2016-apr-08/16 : **PRINTEMPaS**, intensivaj **kursoj** kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

■ 2016-apr-20/24 : **Korusa** renkonto de *Interkant'* kaj **verkadaliere Krajon'-Ankro**

■ 2016-jun-12/17 : La Luaro laŭ la vortoj, **turisma** semajno laŭ verkistoj

■ 2016-jul-04/15 : Dektaga kurso pri la esprimo de la **tempo** en Esperanto

■ 2016-aŭg-06/13 : **SOMERAS**, la Esperanto-**studad**-semajno post FESTO

■ 2016-aŭg-21/28 : Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj

Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)..  
<http://gresillon.org/kontakto>

## Vivjubleoj

En tiu ĉi jarsezono solenis sian (duon)-  
rondan vivjubleon jenaj membroj.  
Elkoran gratulon kaj multan sanon!

**Kamila Bártlová**, Okříšky  
**Květuše Čermáková**, Dolní Němčice  
**Marie Dvořáková**, Písek  
**Petr Chrdle**, Dobřichovice  
**Jana Jakubcová**, Hranice  
**Kvido Janík**, Šumperk  
**Otakar Keclík**, Hranice  
**Josef Kobza**, České Budějovice  
**Petr Kráčmar**, Hořice v Podkrkonoší  
**Ladislav Láni**, Olomouc  
**Petr Pěček**, Náchod  
**Marie Ribasová**, Nový Bor  
**Milan Smělý**, Prostějov  
**Jan Sviták**, Poděbrady  
**František Šolle**, Žandov u České Lípy  
**Pavel Šťastný**, Praha  
**Miloslav Šváček**, Penčice  
**Josef Trojan**, Praha  
**Pavla Zemanová**, Praha

## NI GRATULAS

Al nia akademiano Marek Blahuš kaj  
lia edzino Veronika naskiĝis en februaro  
filino Rozárie.



Estrarano Miroslav Hruška sukcese  
finis studadon en la Mendel-Universitato  
en Brno kaj fariĝis inĝeniero.

## Ni kondolencas

■ La 19-an de novembro 2015 forpasis  
s-ano **Stanislav Štefan** (89 j.) el Kladno



■ La 10-an de decembro 2015  
forpasis s-ano **Miloslav Pelcl**  
(87 j.) el Česká Třebová

■ La 2a-n de februaro 2016  
mortis **Ing. Václava Dušková** (69 j.) el  
Hradec Králové - Kukleny

### **Viktor Sergejeviĉ Sapoĵnikov** (1953-216)

La tradukinto de *Resurekto* de Lev  
Tolstoj en Esperanton kaj aŭtoro de pro-  
praj satiraj verkoj, aperantaj unue samiz-  
date, poste en la eldonejo Sezonoj sub la  
titoloj *Ljusjka Benc* kaj *Proverboj kaj*  
*sentencoj*, la 4-an de februaro 2016 post  
longa malsano mortis en la siberia  
Jalutorovsk. Konataj estas ankaŭ liaj  
"Babiladoj de maljuna provincano" en  
*La Ondo de Esperanto*.

### **Umberto Eco** (1932-2016)

La fama itala verkisto, lingvisto kaj  
filozofo, amiko de Esperanto, forpasis la  
19-an de februaro 2016. Lia libro pri  
serĉado de la perfekta lingvo en la  
historio de Eŭropa kulturo aperis en  
multaj lingvoj, inter ili ankaŭ en  
Esperanto (*La serĉado de la perfekta*  
*lingvo*, 1994) kaj en la ĉeĥa (*Hledání*  
*dokonalého jazyka*, 2001). En ĝi la  
aŭtoro subtenis la ideon de artefarita  
helplingvo. La publiko lin konas precipe  
pro la romano *La nomo de la rozo*,  
sukcese filmita, kaj aliaj romanoj (*La*  
*pendolo de Foucault*, *Baudolino*, *La*  
*insulo de la antaŭa tago*, *La Praga*  
*tombejo*, *La nula numero*) kaj pro liaj  
literaturaj eseoj.

# Jak platit svazu

## Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:  
(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Předplatné časopisů

## Pozor! Změna adresy zprostředkovatele!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz). Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

- Monato:** 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč
- La Gazeto:** 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
- La Ondo de Esperanto:** 700,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 440,- Kč.
- Juna Amiko:** 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5
- Literatura Foiro:** 1280,- Kč (\*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
- Femina:** 870,- Kč (\*580,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4
- Heroldo de Esperanto:** 1330,- Kč (\*870,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3  
(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Periodikum Českého  
esperantského svazu, z.s.  
47. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,**  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto@esperanto.cz  
http://www.esperanto.cz/starto

**Předplatné v Česku**  
(bez členství ve svazu): 200 Kč

**Členská evidence a změny adres:**  
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice,  
vratislav.hirs@esperanto.cz,  
tel. 517 444 117

**Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2016**

---

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**  
47-a jarkolekto

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj**  
aŭ rekte ĉe nia Asocio

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster**  
**Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:**  
7.5.2016

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

## KALENDARO 2016

**2016-04-11/17**

Printempa Seminario en Skokovy

Info: drahotova@esperanto.cz

**2016-05-14** - Printempa Renkontiĝo de  
EK Ŝumperk en Velké Losiny

Info: kvidojanik@seznam.cz

**2016-05-20/21** Renkontiĝo en Svitavy  
okaze de la 760-a datreveno de la urbo

Info: dvor.libuse@seznam.cz

**2016-06-04** E-Tago en Pardubice

Info: pardubice@esperanto.cz

**2016-06-18** Renkontiĝo en Havířov

Info: havirov@esperanto.cz

**2016-06-19** Grimpado al Granda Ĉantorio

Info: suchanekj@seznam.cz

**2016-07-19/23** Antaŭkongreso en Svitavy

Info: cea@esperanto.cz

**2016-08-12/15** Renkontiĝo de ekstendaroj en Lančov

Info: let.lancov@seznam.cz

**2016-09-(17)** PoFeRo de EK Písek

Info: pisek@esperanto.cz

**2016-10-13/16** La 16-a ĈEA-Kongreso  
en Pelhřimov

Info: ces@esperanto.cz

**2016-10-20/23** - IEL Bartošovice

Info: verdastacio@gmail.com

**2016-12-04** Marcipana Kristnasko

Info: svitavy@esperanto.cz

**2016-12-10** Antaŭkristnaska renkontiĝo  
en Písek

Info: pisek@esperanto.cz

*Kompletigita versio aperos en sekva  
numero. Informojn sekvu ankaŭ en  
Kalendaro ĉe [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)*



Protagonistoj de la dua librobapto (vidu p. 15): Irena Pavlásková, Petr Jachnin, Jindřiška Drahotová, Mirka Tomečková a Petr Chrdle  
(foto L. Neužil)



Marcipana Kristnasko en Svitavy



Adventa Matineo kun ekspozicio en la Urba Biblioteko de Písek  
(foto Jaroslava Malá)



Josef Xaver Kobza dum solenaĵo en České Budějovice okaze de lia 95-jariĝo



Silvestro en Česká Třebová



Februara 90-a naskiĝtago de Marie Dvořáková en Písek